



Jam estas oktobro: aŭtuno alvenis. Ekstere la arbaro flavas kaj ruĝas kaj la temperaturo malaltiĝas. Malekstere ni manĝas ŝafon kun brasiko (*fårikål*) kaj eklumigas kand-elojn. Sed ne forgesu ŝangi de somera tempo al vintra tempo! Tio okazos dum la nokto inter la 27-a kaj 28-a de oktobro. De somera al vintra tempo, ni gajnas unu horon: subite ne estas la 3-a horo nokte, sed nur la 2-a. Havu bonan aŭtunon!

– Amelie



# inter ni dirite


- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Amelie Matt – Muntis: jpa

## Rejkjaviko

La 98-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Rejkjaviko venontjare. Sed kion vi scias pri tiu urbo? Ne multe?

Rejkjaviko estas la ĉefurbo de Islando. La nomo Rejkjaviko (*Reykjavík*) signifas fumantan golfeton. La urbo nomiĝas tiel verŝajne ĉar estas kelkaj varmegaj fontoj en la urbĉirkaŭo. Rejkjaviko estas la plej norda ĉefurbo en la mondo – je 64° norde kaj kun nur 118.000 enloĝantoj. La tuta lando havas 312.000 enloĝantoj, tio estas pli malmulte ol la regiono ĉirkaŭ Bergen en Norvegio! Kvankvam jam en la 8-a jarcento la vikingoj ekloĝis sur la insulo, daŭris ĝis 1786, ĝis Rejkjaviko povis nomiĝi urbo. Nuntempe Rejkjaviko estas la centro de la lando kaj scienca, kultura, industria kaj komerca.





Rejkjaviko. Fotis: Andreas Tille, Wikimedia Commons

### KION ONI POVAS FARI EN REJKJAVIKO?

En Islando, la somero ne estas tre varma kaj ankaŭ ofte pluvas. Kial ne viziti unu el multaj muzeoj en la urbo? Rejkjaviko havas nacian muzeon (islande *Þjóðminjasafn*), kiu montras la historion kaj kulturon de la lando. Oni povas rigardi ornamaĵojn kaj armilojn de la vikinga epoko, sed la plej grava objekto estas bronza statuo de Toro, la plej kultata dio en la nordĝermana mitologio.

Ankaŭ tre konata estas Hallgrímskirkja, la plej granda preĝejo en Islando. Tiu kirko altas preskaŭ 75 metrojn. Hallgrímskirkja havas nomon de la islanda poeto kaj verkisto Hallgrímur Pétursson.

Post multe da kulturo kaj historio, oni kutime tre malsatas. Kial ne manĝi la plej bongustajn kolbasojn en Islando?

Tiajn kolbasojn vi povas aĉeti ĉe kolbasejo *Bæjarins beztu pylsur* (la plej bonaj kolbasoj en la urbo). Multaj famuloj jam manĝis kolbasojn ĉi tie, ekzemple politikisto Bill Clinton aŭ muzikisto James Hetfield. En 2006, la kolbasejo ricevis titolon "la plej bona kolbasejo en la mondo" de la brita gazeto *The Guardian*.

Islando havas multajn aĵojn, kiuj estas la plej nordaj en la mondo. Ne nur la plej norda ĉefurbo kaj kolbasejo, sed ankaŭ la plej norda plaĝo en la mondo! Post la Universala Kongreso, kulturo kaj kolbasoj, oni povas naĝi ĉe Ylstrand-plaĝo. Estas tro malvarme, vi diras? Ne! Islando havas multajn varmegajn fontojn. Oni uzas tian varman akvon por varmigi la maron ĉirkaŭ la plaĝo. Ne estas varmega, sed taŭgas por naĝi ĉe la plej norda plaĝo en la mondo.

## Kabana semajfino en la arbaro

De la 31-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro okazis NJEa kabana semajfino en la arbaro. La loko estis kabano de NJE-membro Heming Welde Thorbjørnsen en Østfold. 8 partoprenantoj de Norvegio, Londono, Germanio kaj Svedio kunvenis por babili, naĝi en la proksima lago kaj ludi Esperantajn ludojn.

Ĉu vi ne havis tempon por partopreni? Certe ne daŭros longe ĝis la venonta kabana semajfino – se vi volas. Ĉu vi scias, kie ni rekontiĝu venontfoje? En la nordo, en la sudo? Kion vi volas fari? Sendu viajn ideojn al ni!



Sur la foto de maldekstre malantaŭe: Joel Ericson, Douwe Beerda, Magnus Murr, Heming Welde Thorbjørnsen, Sophia Gibb, Anja Eisemann, Leif Arne Storset kaj Saša Murr. Foto: Saša Murr

## PONDUS

© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com

n-ro 36

